

**ĈION AJN, KION LA PATRO HAVAS, ESTAS MIA; LA SPIRITO RICEVOS DE MI MIAN MESAĜON KAJ TION LI ANONCOS AL VI.**

**– Komento al Evangelio de P. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Johano 16, 12-15**

**En tiu tempo diris Jesuo al siaj disĉiploj:**

**„Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povus nun elporti.**

**Tamen, kiam venos Li, la Spirito de la vero, Li gvidos vin al plena vero. Li parolos ne propranome, sed kion ajn Li aŭdis, Li transdonos al vi; kaj Li anoncos al vi venontajn aferojn.**

**El liaj vortoj montriĝos mia gloro, ĉar li ricevos de Mi mian mesaĝon, kaj klarigos tion al vi. Ĉion ajn, kion la Patro havas, estas mia. Pro tio Mi diris, ke la Sankta Spirito ricevos de mi mian mesaĝon kaj lumigos tion al vi.”**

En la adiaŭa parolado al la siaj Jesuo diras: *“Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi,”* Jesuo do certigas ke li daŭre parolos ankaŭ kiam li ne plu estos. Lia ĉeesto en la komuono estas reala ĉeesto kaj estas la ĉeesto de la majstro kiu instruas al la siaj.

*“Sed vi ne povus nun elporti.”* Kial Jesuo tion diras? Ĉar povas kompreni la mesaĝon de Jesuo nur tiu, kiu, samkiel li, pretas al donaco de propra vivo por la aliaj. Kaj la disĉiploj ankoraŭ ne atingis tiun nivelon.

Jesuo certigas la komunumon de ĉiutempaj kredantoj ke ju pli oni amas, des pli oni sin donacas, kaj des pli oni komprenas lian vorton. Jesuo plu daŭrigas dirante: *"Kiam venos Li, la Spirito de la vero, Li gvidos vin al plena vero"*, nome estas iu irejo kiun la komunumo devas sekvi pere de Jesuo kaj ĝi estas en la veron. Jesuo jam difinis sin mem kiel 'vojo', tio estas strato, nu la Spirito estas tiu kiu ekas, indikas la vojon en la veron.

Tio kio Dio estas, tio kio la homo estas, ne povas esti komplete konata se ne pere de gradoj de ĉiam pli profundaj kono kaj sperto. Iu pli la amo ricevita de la Patro transformiĝas en amon komunikitan al frataro, des pli la komunumo kreskas en tiu ĉi amo kaj en tiu ĉi kreskodinamiko la vizaĝo de la Patro estos ĉam pli klara. Kaj tiu estas la irejo al la vero.

Pro tio por Jesuo la vero ne estas akirita doktrino, oni ne havas la veron, sed oni estas vero kaj oni faras la veron. En la parolado kun Nikodemo Jesuo diris: *"Kiu ajn agas fie malamas la lumon"*, kaj poste por ĝin kontraŭmeti al fio li ne diris "kiu ajn agas bone" sed "Kiu ajn faras la veron", per "fari la veron" do oni celas fari la bonon de la aliaj.

Oni do ne iras al la vero, sed oni iras en la veron, sin enŝovante en tiu kreskantan amdinamikon de Kristo kiu agas por la bono de la homoj.

*"Li gvidos vin al plena vero. Li parolos ne propranome, sed kion ajn Li aŭdis, Li transdonos al vi; kaj Li anoncos al vi venontajn aferojn."* La funkcio de la Spirito ene de la komunumo de la kredantoj estas anonci la estontajn aferojn, laŭlitere "la venontajn aferojn", tiel igante la komunumon kapabla ĉiam havi aktualajn respondojn por la problemoj evidentiĝantaj dum la tempodaŭro.

Al la novaj bezonoj de la kredantoj, de la komunumo kaj de la socio la Sankta Spirito, la Sprito de la vero, donos ĉiam novajn respondojn, evitante la riskon kiun la religia institucio povas alfronti, nome respondi per malnovaj respondoj al la novaj bezonoj de la homoj. Jesuo ne anoncas novan revelacion flanke de la Spirito, sed la aktualigon de la mesaĝo en novaj manieroj kaj formoj por la vivo de la komunumo.

Kaj estas tio kio garantias la vigecon kaj la vivon de la Eklezio. *"El liaj vortoj montriĝos mia gloro, ĉar li ricevos de Mi mian mesaĝon, kaj klarigos tion al vi."* Tasko de la Spirito estas la daŭra kaj senĉesa propono al la komunumo de la mesaĝo de Jesuo. Ne temas – kiel mi jam diris – pri nova mesaĝo, sed pri la kompreno de la sama mesaĝo sub la novaj cirkonstancoj kiu prezentiĝos.

Tiu agado igas ĉiun fojon pli evidenta la amo de Jesuo al la siaj. Tiu estas la signifo de 'glorigi'. Fine Jesuo certigas: "*Ĉion ajn, kion la Patro havas, estas mia*", la amplekco, "*pro tio Mi diris, ke la Sankta Spirito ricevos de mi mian mesaĝon kaj lumigos tion al vi.*" Tio kion la Patro kaj Jesuo kune posedas estas la amplekco, la Spirito, kaj estas ĝuste la komuniko de tiu amo la agado de la Spirito al tiuj kiuj lin akceptas.

La ripetado trian fojon de la verbo 'anonci' substrekas la gravecon kiun la evangeliisto metas en la anonco; ne temas nur pri invito al aŭskultado, sed al akceptado kaj ĝia praktikado. La selektokriterio por vidi se tio kio estas komunikata venas do de Dio estas la amo.

Se la mesaĝo, se tio kio estas anoncata, estas favora al la homo kaj al lia bono, tio venas de la Patro, kiu zorgas pri la bono kaj kresko de siaj filoj. La Patro kaj Jesuo havas kune ununuran emon: la bonon de la homoj!